


BELGA ESPERANTISTO



Oficiala dumonata Organo de
REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Redaktoro-Administranto :
la Prezidanto de R.B.L.E. :
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Fondita en 1908a
★
Abonprezo : Fr. 100,-

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Prezidanto : S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44. Wilrijk.

Vicprezidanto-Kasisto : S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Vicprezidantino : S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

Ĝenerala Sekretario : S-ro H. Sielens, "Internacia Marista Domo"

Falconrui, 21, Antverpeno.

(Postĉeknumero : R. B. L. E. : 13.37.67)

POR VIAJ HORLOĜOJ KAJ JUVELOJ

NUR LA ADRESO

Marcel De Vooght

Zuidzandstraat 3 BRUGGE

JUVELISTO - HORLOĜRIPARISTO

Ĉiuj ŝanĝoj kaj reparaĵoj

Granda stoko

Ĉi vi volas gajni 10.000 Frankojn

Eklaboru tuj artikolon pri nia Ekspozicio 1958

Sub la nomo « Internacia Premio de la Perioda Gazetaro », la Asocio de Belgaj kaj Eksterlandaj Periodaj Ĵurnalistoj volas rekompenci, post konkurso, la aŭtoron de la plej bona artikolo, publikigita en la Perioda Gazetaro kaj kiu rilatos al Universala kaj Internacia Ekspozicio de Bruselo 1958a. Tiu rilato estas komprenenda en la plej vasta senco de la esprimo.

Nur ekzemplecele kaj neniel limige, tiuj-ĉi artikoloj povos esti, ĉu raporto dediĉata al la Universala kaj Internacia Ekspozicio de Bruselo; ĉu pristudo de unu el ĝiaj aspektoj; ĉu komentario de la signifo de tiu ĉi grandega popola renkontiĝo; ĉu skribaĵo por inciti turistojn, vojaĝantojn, ĉiuspecajn homojn viziti la unuan mondekspozicion starigatan post la fino de la dua mondmilito; ĉu tekstoj, kiuj lumigas la ekonomian, kulturen, socian valoron de la Ekspozicio aŭ ĝian kontribuon al la afero de la Paco kaj al pli bona reciproka kompreniĝo inter la popoloj, k.t.p., k.t.p.

La tekstoj entenos maksimume dumil vortojn. Ili devos esti publikigataj en perioda revuo aŭ eldonaĵo en franca, nederlanda, germana, angla, hispana, itala, *esperanta* lingvoj aŭ en unu el la dialektoj de belga Kongolando aŭ de Ruanda-Urundi.

La artikoloj devos esti *aperintaj antaŭ la fino de junio*, ĉar la ensendaĵoj al la ĵuĝantaro devas okazi *antaŭ la 30a de junio 1958a*.

Nia revuo volonte presigos en sia maja-junia numero artikolon, skribitan en nia lingvo por ebligi al la aŭtoro partopreni la konkurson, kies premio valoras *DEKMIL frankojn*.

Kiu deziras detalan regularon de tiu ĉi konkurso petu ĝin al la direkcio de nia revuo.

Ni konsideras ke la fakto, ke la organizantoj akceptis ankaŭ nian lingvon flanke de la aliaj gravaj naciaj lingvoj, estas speciale atentinda kaj ke ni nepre devas helpi por ke la ĵuĝantaro *ricevu almenaŭ kelkajn artikolojn en Esperanto*.

En la ĵuĝantaro, kiu konsistas el diversaj eminentaj literaturistoj, el gvidantoj de ambaŭ la radiostacioj belgaj kaj de la ĵurnalistaj Asocioj, ankaŭ kunsidas, kiel Esperantisto, la Prezidanto de R.B.L.E., S-ro Maurice Jaumotte, prezidinto de la Ĝenerala Belga Ĵurnalista Asocio (Sekcio Antverpeno-Limburgo).

Do, ne prokrastu : *Petu la Regularon kaj tuj ekverku vian artikolon*. Ankaŭ ne prokrastu vian ensendon.... *Ni disponas nur pri unu numero por la enpresigo kaj do, eventuale, devos elekti inter la ensenditaj tekstoj : la unue alvenintaj havos do la plej grandan ŝancon !*

La artikoloj devos aperi sen subskribo sed kun pseŭdonimo, ĉar ĉe la alsendo al la ĵuĝantaro ĉio devos okazi anonime kun devizo kaj cifero aŭ nombro.

Ĉu ĉiuj kotizoj estas repagitaj ?

Pro la multekosteco de la presado, ni ne plu povis sendi tiun ĉi numeron al la ne-repagintoj.

Tiuj-ĉi do ne plu havos okazon legi tiun ĉi artikolon.

La Grupoj do klopodu kie eble plej

baldaŭ repagigi tiujn, kiuj forgesis tion fari kaj TUJ informu nin, por ke ni povu sendi la ekzempleron N° 2 de nia revuo.

Ekde proksima numero, ni ankaŭ devos forpreni la malgrandajn anoncojn, kiujn ni je rabatita prezo enpresas por la grupaj membroj-komercistoj.

Ora Jubileo en Charleroi

Jam de decembro, la Karlareĝa Grupo Esperantista ekzistas de 50 jaroj. Ĝi tamen ne organizis festojn je la ekzakta datrevena tago, ĉar ĝi akceptis organizi la tiuĉijaran Beneluksan Kongreson, kiu devis esti okazo por tiu memorigo.

Ĉar tiu-ĉi, pro diversaj cirkonstancoj, ne okazos, la komitato de la Grupo decidis tamen festi solene tiun Jubileon kaj elektis la *dimanĉon, 27an de aprilo*.

Je tiu ĉi momento, ni jam povas esperi belan printempan tagon kaj, aliflanke, ĉar estos nur la tutunuaj tagoj de la Brusela Ekspozicio, — kiam multaj pavilonoj estos ne jam oficiale inaŭgurataj, — tiu ĉi granda evento ne jam povos esti konkurenco por tiuj ĉi niaj festoj.

Grandlinie la programo estos jena :

Je la 10,30a h. : Jubilea kunsido.

Je la 12a h. : Solena Akcepto en la Urbdomo.

Je la 13a h. : Komuna tagmanĝo.

Je la 15,30a h. : Teatra kaj kabareta festo.

Je la 18a h. : Adiaŭo.

Samideanoj el Antverpeno jam promesis sian kunhelpon al la efektivigo de la programo de la posttagmeza festo.... Sed la organizantoj ankaŭ kalkulas je aliaj kunlaboroj.

Ĉiukaze ĉiu, — jam ekde nun, — rezervigu la tagon de la 27a de aprilo, kaj niaj Grupoj de Antverpeno, Bruĝo, Bruselo kaj el la Lieĝa provinco antaŭvidu karavanetojn al Karlareĝo tiun tagon !

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S. P. R. L.

Tel n-roj 223.01 - 225 37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj ; KATOKULO, por signalvitroj.

Zamenhof-fondaĵo

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de la Majstro

En la lasta kunsido de la Komitato de U.E.A. dum la Kongreso en Marseille estis principe akceptata propono farita nome de la polaj komitatanoj pri la festado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof en 1959a.

La estraro de U.E.A. intertempe konsideris ke estas necese utiligi tiun unikan okazon ne nur por digne festi la memoron de la Majstro, sed ankaŭ por speciale vasta informado pri la Internacia Lingvo, por penetrado en pliajn kulturajn mediojn, firmigo de la pozicioj en diversaj interŝtataj organizaĵoj kaj kulturaj movadoj.

La estraro fakte do imagas la festadon de tiu ĉi 100-jara datreveno, kiel



La Universala

Ekspozicio... kaj Ni

La testoj aŭ ekzamenetoj de "Interpretistoj"

En nia antaŭa numero, ni anoncis ke dum la dua duono de la monato de februaro okazos en diversaj urboj la testoj por akiri la ateston de bonvolema interpretisto por la Universala Ekspozicio de Bruselo.

Intertempe la E.K.I. de Antverpeno kaj Bruselo jam okazigis tiujn testojn kaj ni povas anonci ke diversaj elementoj, apartenantaj al ĉiuj Ligoj, Asocioj kaj Movadoj prezentis sin.

Nun la speciala atesto de la Ekspozicio estas jam akirita de 28 bruselaj kaj dekduo de antverpenaj samideanoj.

Similaj testoj ankoraŭ okazos en aliaj urboj kaj, eventuale kaj se necese, refoje en la du cititaj urboj.

Por tiuj, kiuj ne priatentis la aferon, ni diru ke temas pri kelkminuta babilado pri turisma temo, sed ke ni petas la kandidatojn indiki almenaŭ OK tagojn, dum kiuj ili restos absolute je la dispono de la prizorgantoj por gvidi esperantistojn, ĉu tra la Ekspozicio, ĉu eventuale en propra urbo.

Tiuj 8 tagoj povas esti, ĉu 8 sinsekvaj tagoj, do unu semajno de libertempo; ĉu 8 tagoj apartigitaj : ekz. 8 sabatoj aŭ 8 dimanĉoj difinitaj aŭ 4 semajn-finoj.

Ĉiu intereso direktu sin al sia Grupo aŭ al sia Ligeŝtaro por ekscii, kie kaj kiam okazos ankoraŭ ekzameneto en sia urbo aŭ en loko proksima al sia loĝejo.

imponan manifestacion mondan de la Esperantismo. Kaj ĝi planis diversajn aranĝojn, pri kiuj multaj detaloj aperis jam en la revuo de U.E.A.

Ni volas tie ĉi atentigi nur pri la fakto ke por povi plenumi la planon, estas necesaj ne nur bona volo, multe da laboro kaj oferema sindediĉo, sed *ankaŭ financaj rimedoj*.

Tial estis starigata speciala *Fondaĵo-Zamenhof*, al kiu povas kontribui, laŭ siaj eblecoj, ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj unuopuloj.

La kontribuoj povas esti sendataj al la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam aŭ la perantoj de U.E.A., nome por niaj legantoj la Liga Kaso.

Mainz - 2-9 Aŭgusto 1958

En nia antaŭa numero, ni resumis ĉion interesan aperintan en la tri unuaj komunikoj de la L.K.K. kaj, en lastmomenta novaĵeto, ni ankoraŭ povis kunpresigi alineon el la suplemento al la tria komuniko, kiu rilatis al la postkongresaj ekskursoj, kiuj, kiel ni jam diris, estas antaŭvidataj :

1. Kvartage al la folkloraj montoj de Bavarujo kaj Tirol;
2. *Tritage al la Mondekspozicio en Bruselo.*

Ni nun publikigas la ĉefajn detalojn, kiujn krome enhavas tiu ĉi suplemento kaj la kvara komuniko :

Urbaj tramoj : La Urbo Mainz decidis disponigi al la kongresanoj specialan tramkarton, validan sur ĉiuj urbaj linioj dum la tuta kongresa semajno, je kosto de 5 markoj. La karto estos aĉetebla en la kongresejo.

Novaj filmoj en Esperanto : La mondkonata Firmo Gevaert decidis eldoni sian kolorfilmon en Esperanto. La filmo estos unuafoje montrata okaze de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

Pri la urbo Braunschweig estas nun eldonata nova filmo originala en Esperanto. Ĝi estos montrata, kune kun aliaj Esperanto-filmoj, dum la Kongreso.

Internacia CSEH-seminario : Sub la oficialaj aŭspicioj de la Urbo Mainz, de la 31 julio-2 aŭgusto 1958 okazos Internacia Seminario por prepari kursgvidantojn laŭ rekta metodo, gvidota persone de S-ro Andreo Cseh. La lecionoj okazos dum tri tagoj, matene de la 9.30 h.-12.30 h. kaj de la 3-a h.-6-a h.

La kostoj de la kurso kun atesto pri partopreno estas 9 markoj. En la restoracio de la kursejo oni povas ricevi la du ĉefmangojn (tagmangon kaj vespermangon) por 5,50 markoj tage : entute 16,50 markoj.

Por informoj : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag.

Magnetofona invito : La Urbestro de Mainz, S-ro Franz Stein, surbendigis sur magnetofona rubando oficialan invitsaluton en Esperanto, direktitan al la Esperantistoj en la tuta mondo. Esperanto-societoj aliĝintaj al Landa Asocio povas senpage ricevi la bendon « La Urbestro de Mainz invitas la esperantistojn » (rapideco 9,5), mendante ĝin per simpla poŝtkarto ĉe kongresa oficejo.

Ekskursoj : Dum la Kongreso okazos jenaj samtempaj tuttagaj ekskursoj :

1. persipe sur la romantika Rejno, preter la fabela Lorelei, kun vizito ŝnurfervoja al « Germania » kaj tagmango en Bacharach/Steeg.
2. Per speciala vagonaro kun danckupeoj al la pentrinda Heidelberg, kun tagmango en la Festhalo de Eberbach.
3. Per aŭtobuso, veturante en la montara Taunus-regiono, al la naskiĝurbo de Goethe, Frankfurt, kun akcepto en la Urbodomo kaj tagmango en la ekzotika Palmgardeno.

Du postkongresaj ekskursoj iros :

1. Kvartage al la folkloraj montoj de Bavarujo kaj Tirol.
2. *Tritage al la Mondekspozicio en Bruselo.*

Dumtagaj vizitoj tra Mainz kaj Wiesbaden okazos dum la Kongreso.

Junula vespero : LKK decidis oficialigi kaj subteni dumkongresan amuzan vesperon por gejunuloj, organizatan de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Literatura kaso : Alte taksante la signifon de la Esperanto-Literaturo por la

progresigo kaj fina venko de Esperanto, la LKK decidis asigni al la Literatura Kaso, kiu konsistigas la premiojn por la Belartaj Konkursoj, la sumon de 100 markoj. LKK invitas ĉiun esperantiston donace subteni tiun Kason.

Teatra Vespero : La Internacia Arta Teatro, formita grandparte de jugoslavaj aktoroj, sub la reĝisorado de S-ro S. Flego el Parizo, ludos en Esperanto dum la Universala Kongreso la ĉefverkon de la norvega verkisto Ibsen, « Fantomoj ».

Novaj kotizoj : Post la 31-a de marto ekvalidos jenaj kotizoj :

kongresano : 36 markoj

edzino : 18 markoj

junul(in)o : 12 markoj (ne pli ol 20 jaraĵ aŭ studentoj).

Individuaj Membroj de UEA rajtas rabaton de 5 markoj; edzino de 2,5.

Fervoja rabato : La Germanaj Federaciaj Fervojoj donas rabaton de 33,33 % al ĉiu eksterlanda grupo de 10 ĝis 24 personoj; grupoj de pli ol 25 personoj ĝuas rabaton de 50 %. La rabato validas de la germana landlimo ĝis Mainz kaj revene.

Inaŭgurejo : La nuna konstruata Sporta Palaco de la Universitato, la plej granda kaj moderna konstruaĵo de Mainz, estos la Inaŭgurejo de la 43-a.

Diservoj : Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj Kristana Esperantista Ligo Internacia okazigos dum la Kongreso la koncernajn diservojn.

Bankedo : Por festi la oran Jubileon de UEA okazos dum la Kongreso komuna bankedo. Kotizo : 10 germ. markoj.

Oratora konkurso : Por gejunuloj ĝis 25 jaroj okazos Oratora Konkurso pri « Juna kaj pl'aĝa generacio ».

La premioj disponigitaj de LKK kaj de UEA konsistas el :

1. stipendio de 70 markoj por partopreni en internacia esperantista aranĝo
2. Esperanto-libroj ĝis 50 markoj
3. Esperanto-libroj ĝis 30 markoj.


Libera komedio : La Internacia Arta Teatro, sub la reĝisorado de S-ro Sdrjan Flego, interkonsente kun LKK prezentos en Mainz, krom « Fantomoj » de Ibsen, ankaŭ alian teatron ludon, sub la titolo « Nova Commedia dell'Arte ». La teatraĵo, kiu okazos sabaton 9 aŭgusto post la fermo de la Kongreso, estas rezervita al la kongresanoj, kiuj anticipu abonon ĝin ĉe la Kongreso. Enirkosto : 5 germ. markoj.

Kongresaj sekcioj : La Estraro de UEA decidis, ke la Kongreso laboru en du sekcioj. La unua pritraktos : « Reciproka aprezo de okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj. La rolo de la Internacia Lingvo » (Prezidanto : Prof. Yagi — Japanujo —; Cefraportanto : Prof. Lapenna — Britujo). La Dua pritraktos : « La lokaj societoj — kerno de nia Movado » (Prezidanto : D-ro Herrmann — Germanujo —; Raportanto : S-ro Strönn-Svedujo).

Kaj ni aldonu, ke en « Heroldo de Esperanto » de la 16a de februaro estas presata la novaĵeto, ke jam pli ol Mil Kongresanoj enskribiĝis.

Se oni komparas tiun ĉi ciferon kun tiuj de antaŭaj kongresoj je la sama dato, oni ja devas alveni al la konkludo ke la Kongreso 1958a en Mainz estos verŝajne rekorda laŭ la nombro de partoprenantoj.

Ĉar la vojaĝo el nia lando ne estas vere tre longa, kompare al tiu dum aliaj jaroj, ni instigas niajn membrojn aliĝi kaj aliĝi kiel eble plej frue por la plifaciligado de la organizaj laboroj de la LKK.



Zamenhof monumento en Vieno

Kontribuoj bone alfluas

La 27an de julio proksima estos inaŭgurata, en Vieno, inda Zamenhof-monumento, la unua tia en ĉefurbo de iu ŝtato.

Laŭ la februara Informilo de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, ni ekscias ke la kontribuoj, kiuj devas kompletigi la sumon necesan por la starigo de la monumento, bone alvenas el ĉiuj partoj de la mondo.

Ĉiu povas sendi sian obolon ĉu per respondkuponoj ĉu per bankbiletoj en letero, ĉu per ĉeko.

Tiuj, kiuj donacos almenaŭ kvin respondkuponojn, ricevos siatempe foton de la monumento kun speciala esperanta poŝtstampo. Kiu donacos pli, ties nomo estos krome eternigata sur la dokumento enmurigota en la soklo de la monumento.

Donacoj povas esti sendataj al Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I, kun indiko « Monumenta Komitato ».

La fondinto-direktoro de la muzeo, S-ro Hugo Steiner, kiu ĵus festis sian 80an naskiĝtagon kaj kiun ni, tiukaze, varme kaj sincero gratulas, danke ricevos ĉiujn kontribuojn.

* *

La Nobel-premiito por la Medicino, Daniel Bovet, uzas Esperanton.

La Nobel-premiito por la Medicino, Daniel Bovet perfekte parolas Esperanton, krom francan, germanan, anglan kaj italan. La patro, Prof. Pierre Bovet, kiu siatempe estis direktoro en Genevo de la Instituto J.J. Rousseau, aktive uzis la Internacian Lingvon por pedagogiaj celoj, inter alie, li gvidis grandan enketon pri la instrumentoj

por Esperanto kaj pri la koncernaj rezultoj en la diversaj landoj.

Lingvistoj por Esperanto.

La « Institute of Linguists » petis de Brita Esperantista Asocio prelegon pri la Internacia Lingvo Esperanto. En lingvistaj medioj kaj lingvaj Akademioj pli kaj pli kreskas la intereso por Esperanto.

pri arto

Enkonduko : Tre ofte okazas ke personoj kiuj ekz. iras al ekspozicio de pentraĵoj humile konfesas ke ili ne scias ĉu la montritaj verkoj estas vere belaj, ke ili ne komprenas la arton. Ankaŭ multaj studentoj ne scias en kio vere konsistas la arto. Oni tuj rimarkas tion kiam oni ilin aŭdas diskuti pri tiu temo. Estas tial ke mi volas doni kelkajn ideojn pri „arto”.

I. — La subjekto : Ni unue donas kelkajn pensojn pri la persono kiu staras antaŭ artaĵo. En lia sinteno je la artaĵo ni faras distingon.

Ni distingas la komprenon de la artaĵo kaj la ĝuon pri artaĵo.

A. — Kompreni : por kompreni ni devas koni la signifon de la artaĵo. Tiu ekkono fariĝas laŭ du manieroj. Aŭ oni sentas ĝin spontane, per la intuicio. Se tio ne okazas, oni devas ekkoni la signifon de la artaĵo per la esploro kaj la lernado de la diversaj cirkonstancoj en kiuj la artaĵo ekestis : la historiaj aŭ geografiaj, filozofiaj, psikologiaj, personaj kaj eble ankoraŭ aliaj cirkonstancoj. Kutime ambaŭ manieroj influas sur la homo. Preskaŭ ĉiam la ekkono de la cirkonstancoj, la ekkono de la historio- (= la historia evoluo kiu kondukas al la kreado de tiu artaĵo) de ĝi, pligrandigas la intuician komprenon de la artaĵo. Ofte okazas ankaŭ ke oni tute ne intuicie komprenas artaĵon. Sed kiam oni lernas la historion de ĝi, oni subite sentas ke la lumo venas en la intuicio kaj tiam oni ankaŭ intuicie komprenas.

Ekzemploj : oni povas intuicie kompreni la arton de Greka Dorika templo

kiam oni estas sub la impresoj de la peza seriozeco, graveco, preskaŭ pesimismo kiu elradias, kiu kovras tiun sobran angulon, multpezan stilon. Tamen vi pli bone komprenos ĝin kiam vi konas la cirkonstancojn ekz.. kiam vi konas la filozofion de la unuaj Grekoj.

Povas esti ke iu tute ne komprenos la poemon „La Infana Raso” de W. Auld, sed kiam oni klarigos ĝin al li, ke li sammomente ankaŭ intuicie komprenos ĝin. La klarigo malfermis lian intuician komprenon.

La intuicia kompreno fariĝas kiam la intelekta klereco estas iugrade sur la nivelo de la ecoj kiuj estas en, kaj radias el la artaĵo.

B. — ĝui : Por ĝui artaĵon, ne nur la intelekta klereco devas esti sur la nivelo de la ecoj kiuj estas en, kaj radias el la artaĵo; sed ankaŭ la anima stato devas esti sur tiu nivelo. Oni devas plej profunde, „en la koro de la koro” kiel oni diras, emi al tio kion la artaĵo signifas. Oni devas ami, karesi la idealojn kiuj speguliĝas sur la artaĵo.

Ekzemplo : estas homoj kiuj povas ĝui la arton de Gotika katedralo kiu altentiras, ĉielentiras la homan rigardon kaj la homan penson; per ĝiaj pintarkoj kiuj similas al en preĝo kunplektitaj brakoj levitaj al la nuboj.

Kaj tie-ĉi montriĝas la dualismo inter ĝui kaj kompreni.

Ekzemplo : estas homoj kiuj certe kapablas kompreni la stilon Louis XIV sed kiuj tute ne ĝuas ĝin. Ili vidas la kristaliĝon, la spegulon de la spirito de tuta tiu epoko sur tiu stilo. Kaj en tiu senco ili komprenas tiun stilon.

Sed ili tre malŝatas tiun spiriton kaj do ne ĝuos tiun arton, kiu estas la bildo de tiu spirito. Kaj tamen tie-ĉi oni devas ankoraŭ fari distingon. Povas esti ke inter tiuj homoj kelkaj diros kiam ili staros antaŭ specifa Louis XIVa meblo aŭ salono: „kia bela artaĵo”.

Ĉu ili ĝuas? Eble ili volas nur diri ke laŭ ili tiu meblo aŭ salono estas vere tre bone sukcesinta enkorpiĝo de la Louis XIVa spirito, ke ĝi bone karaktermontras la epokon.

Kaj la scio de tio, la vido, en unu konkreta bildo de la animo de tuta unu epoko donas ian ĝojon. Rimarku bone; ĝojo kaj ne ĝuo. Ni estas nun plene sur la tereno de la psikologio. Mi do diras ke en la ĝojo estas ĉiam kelkaj eroj da ĝuo ankaŭ. Tamen restas tie-ĉi la tre granda diferenco inter ĝojo kaj ĝuo.

Ĝojo: sekvo de kompreno.

Ĝuo: ĉar oni tre interne, intime ŝategas, amas. Almenaŭ tio estas ĝusta sur la tereno de la arto. Ni tiel povas konkludi ke la ĝojo pri artaĵo estas precipe sekvo de la kompreno de artaĵo kaj tiu kompreno mem estas sekvo de la intelekta nivelo de la homo rilate al la artaĵo.

Kontraŭe, la ĝuo estas precipe sekvo de la animŝtato de la homo kiu vidas speguliĝon en la artaĵo.

II. — **La Objekto**: ĉio tio skribita ĝis nun estis pri la sintenado de la subjekto al la objekto = de la homo al la artaĵo. Nun kelkaj vortoj pri la objekto mem: la artaĵo.

A. — *Tekniko*: Kiam oni diras ke Jan van Eyck mirige pentras la transiron de la lumo al la ombro, al la mallumo; aŭ kiam oni diras ke Hans Memlinc kapablas harmaldike pentri, ĉu oni faras aludon al la arto de ambaŭ?

Tute ne. Oni faras aludon al ilia tekniko. Oni diras tiam fakte ke ili

majstre teknikas, ke ili havas en mano ĉiujn rimedojn. Ĉu tio estas arto? Ne, ĝi estas lerteco. Ĉu lerteco estas arto? Multaj pretendas ĝin.

En la historio de la arto oni multajn kreaĵojn laŭdas kiel grandajn artaĵojn ĉar ili estas finaj venkoj sur teknikaj malfacilaĵoj.

Sed se tekniko estas arto, tiam la tereno de la arto estus multe pli vasta ol oni ĝis nun supozis. La piedpilkludado, ekzemple, devas esti konsiderata kiel branĉo de la arto.

Estas ludistoj kiuj estas mirinde lertaj. Estas ludpartoj kiuj estas farataj per majstra tekniko? Ni do sugestus ke oni povas laŭdi teknike grandajn kreaĵojn kiel artaĵojn nur se tiuj teknikaj venkoj ebligis pli bone vidigi la artan karakteron, se ili do plialtigis la „Artaĵon”.

Ni do ne ankoraŭ atingis la esencon de „arto”.

B. — *Manierismo*: Kiam oni diras ke H. Memlinc havas preskaŭ ĉiam pejzaĝon en la fono de siaj pentraĵoj, oni denove ne faras aludon al la arto de Memlinc sed nur al maniero, kutimo, procedo de li. Same kiam oni atentigas pri la mezuro, la grandeco de personoj aŭ bestoj sur la pentraĵoj k.t.p. Ankaŭ la „s” formo de la verkoj de Rubens. Tamen estas vere ke tiuj procedoj kelkfoje pli altigas la arton. Ekzemple la „S” formo ĉe Rubens estas bonega ilo por pli intense montri la patoson. Aliflanke se oni tro ofte kaj precipe ne nature uzas tiajn procedojn, oni venas al manierismo. Tio malhelpas la serenecon, la viv-realecon kaj aliajn ecojn de la vere granda artverko.

C. — *Arto objektiva aŭ subjektiva*: ĉu la artaĵo estas io objektiva, jes aŭ ne? Ĉu ĝi estas objektiva aŭ subjektiva? ĉu la artaĵo estas bela en si mem, sendepende de la opinio de la homoj (= objektiva) aŭ ĉu ĝia beleco nur

ekzistas laŭ la gustoj de la homoj (= subjektiva)? La beleco de floro estas subjektiva. Iu opinias la rozon belega, alia opinias ĝin bela, alia beleta. Ĉiu el tiuj tri pravas. Li ja fakte nur diras: laŭ mia gusto ĝi estas belega, aŭ bela, aŭ beleta. Oni ĝenerale konsentas ke la rozo estas bela ĉar la plej granda parto de la homoj trovas ĝin bela. La beleco do malsimilas por ĉiu homo.

Ĉu tia estas la artaĵo? Ĉu la beleco de la artverko ankaŭ dependas, kaj ekskluzive dependas de la opinio de la homoj?

Jes, se oni konsentas kun tio kion oni tre ofte diras ke „la menso taŭgas por ekkoni la veron, la konscienco por ekkoni la bonon kaj la gusto por eksciti la belon”. Tiam, jes, la beleco de artverko estas subjektiva ĉar estas evidente ke la gusto de ĉiu persono malsimilas. Do.

Sed ni ne akceptas tion. Artajo estas io bela en si mem. Ĝi ne dependas de la opinio de ĉiu homo. Ne ĉio kio estas bela, estas ankaŭ arta (kompreneble) sed ĉio kio estas arta, estas ankaŭ bela (nepre certe). Sed ĝi estas ankaŭ ankoraŭ io pli ol bela; ĝi estas „arta” aŭ, se vi volas „artbela”. La pruvo. Se vi troviĝas antaŭ „belaĵo”, ni diru ekz... bela taso aŭ bela vazo, vi sentas en vi agrablan senton sed ĝi vere ne tre profunde trafas vin. La sento estas vere nur korpa, materia. Via najbaro vidas la saman objekton kaj povas okazi ke li ne opinias ĝin bela. Eble vi diros al li: jen tiuj linioj kaj tiu kolormikso plaĉas al mi. Li eble respondos: al mi ne. Kion vi plu diros?

Vi estos devigata konsenti ke tio kio estas bela por vi, ne estas bela por li.

Sed se mi troviĝas antaŭ artverko, mi diru, Gotika katedralo. Eble mia najbaro diros „Mi ne opinias ĝin bela”. Sed mi, male, ne nur sentas agrablan suprajcan senton, sed eĉ mi sentas

min trafita en mia tuta persono. La sento kiu igas min admiri ĝin estas sento kiu estras mian tutan personon. Nenio en mi estas netuŝita. La artaĵo parolas al mi. Ĝi havas signifon kaj objektivan valoron. Ĉu tiam mi diru: „jes la artaĵo estas bela por mi, sed ne por li. La beleco de tiu artaĵo dependas de ĉies gusto”? ne, mi diros: „mia najbaro ne komprenas ĝin. Mi klarigos al li la belecon, la artecon de tiu artaĵo. Mi klarigos tion kio estas en tiu verko”. Kaj fine, eble daŭros tre longtempe, li komprenos, li ekvidos.

D. — *Eduko pri arto*: Se artverko estas bela en si mem, objektiva beleco, sendependa de la opinio de la homoj, tiam povas okazi ke iu verko estas vere artbela kvankam neniu konsentas ke ĝi estas artbela. Tio ŝajnas tre stranga. Kaj tamen ĝi estas ebla. Kaj ĝi jam okazis. Nun oni konsentas ke Gotika katedralo estas unu de la ĉefverkoj en la tuta longa historio de la arto kaj ke la Mezaĝo produktis geniajn laŭ arta vidpunkto.

Ne depost ĉiam oni konsentis tion. Dum la Renaissance-periodo, oni tute kaj radikale kontraŭdiris tion, kaj estas tial ke la Renaissance-istoj donis al tiu arto la nomon de „gotika” volante signifi ke ĝi estas nur indi de la barbaraj necivilizitaj Gotoj.

Io simila ne plu tiel ĝenerale okazas nun. Tamen multaj homoj konfesas ke ili nek vidas nek sentas la artbelecon de iu verko kiu vere estas arta. Tiuj homojn oni devas eduki pri arto. Kaj fakte se la artverko estas bela en si mem, ankaŭ bela se eĉ miloj da homoj ne opinias ĝin bela, tiu beleco devas esti klarigebla. Devas esti eble montri al la homoj kial tiu verko estas artbela. Tiu verko devas esti komprenebla kaj komprenigebla: oni do devas pensi pri la juĝata artverko. Oni devas klarigi la kialojn de ĝia beleco, tion kio estas bela en ĝi, tion kio igas ĝin

bela. Do la menso ankaŭ taŭgas por ekkoni la belecon de artaĵo.

III. — Kio estas arto?

Por ke iu verko estu artbela, ĝi devas elradii ion de la mistero de la vivo aŭ de la homo.

Tre malfacile oni trovas difinon de „arto”. Oni ja trovas multajn difinojn kiuj fakte nenion diras. Sed ni volas difinon kiu montras la esencon de la arto. Ankaŭ ni konstatas ke ne ĉiam oni pensis egale pri arto. Laŭ la koncepto de tre multaj, la fotografiaĵo estis la malo de arto. Nun oni jam parolas pri artfotografado. Mi ne aludas tie-ĉi la ŝanĝojn per kraĵono sur la fotografitaj vizaĝoj sed mi parolas pri fotografado precipe de belaj pejzaĝoj kaj tiujn fotografiaĵojn oni emas nomi artverkoj. Ĉu tio povas esti arto? Laŭ mia opinio: jes. Kial? La naturo estas bela. Sed kelkfoje la naturo kaptas tute speciale la atenton. Kelkaj pejzaĝoj estas pli belaj ol la aliaj. Povas okazi, kaj efektive okazas kelkfoje ke la subiranta suno lumigas tute trankvilan, vente trankvilan arbaleon per ensorĉiga lumo. Tiel bela ĝi estas ke vere ĝi frapas nin. Ni sentas nin profunde tuŝataj, ĉar jen, la mistero kaj la grandeco de la natura vivo staras antaŭ ni. Nu kiam oni sukcesis kapti sur lumbildo, tiun vivantan, al ni parolantan naturaspekton, oni donas ion pli ol nuran fotografadon, oni donas ion pli ol nurajn arbojn; oni montras la misteron de la vivo. Tio estas arto.

Kaj nun ni venas al la difino de „arto”. Por ke iu verko estu artbela, ĝi devas elradii ion de la mistero de la vivo aŭ de la homaj sentoj aŭ spirito. Ni rimarku tamen bone ke la artverko devas esti artbela, kaj laŭ la formo kaj laŭ la enhavo.

Ekzemple: filozofiaj, tre interesaj pensoj pri la homa vivo nur estos „artaĵo” se ili estas diritaj en tre bela prozo aŭ laŭ ĉiuj reguloj farata poezio.

Ekzemple unu prozaĵo aŭ poeziaĵo kun bonaj rimoj, riĉaj sonoj k.t.p. tamen ne estos „artaĵo” se en ĝi estas pritraktata banalaĵo; aŭ se la pensoj aŭ la sentoj, en ĝi esprimitaj, ne konformas al la grado de graveco de la prikantita okazaĵo aŭ afero. (Ili ne vekas emocion sed nur ridigas).

Io de la mistero de la vivo aŭ de la homaj sentoj aŭ spirito. Antaŭ tio ni staras se en iu artverko ni vidas la pesimismon de la aŭtoro, aŭ la pasian temperamenton aŭ la turmentitan animon aŭ la idealon k.t.p. Antaŭ tio ni staras, ankaŭ, se la aŭtoro tre ĝuste reprezentas la realecon sed tiam li devas prizorgi speciale la misterecon de ĝi: ĉu la belecon, ĉu la forton, ĉu la kreikapablecon, ĉu la fruktodonecon k.t.p. Antaŭ tio ni staras ankaŭ se la aŭtoro multege fantazias, superŝutas ekz... per blindiga lumego plej diverskolora, enkondukas nin en plej belan paraĉizon, montras tiamaniere sian internan vivon, sian aspiron, sian imagpovon, sian ĝojon kaj ĝuon k.t.p.

Fina vorto: ne ĉio estas nun dirita pri arto. Tute ne.

Nur kuŝas tie-ĉi kelkaj pensoj kiuj povas gvidi vin. Ne kredu ke depost nun vi tuj komprenos ĉiujn artverkojn. Vi devas ankoraŭ lerni rigardi.

Rigardi al la multaj teknikaj ecoj. Vi devus ankaŭ komenci per iometa studado pri la ĉefverkoj en la longa arthistorio.

Sciu ankaŭ ke en tiu fako multo dependas de la ebleco senti.

Rilate al artaĵo oni ĉiam multe pli intuicie sentos ol oni konscie kaj klare scios. Oni ĉiam multe pli sentas ol oni scias kaj oni ĉiam multe pli scias ol oni kapablas esprimi.

Drs. F. ROOSE.

Rimarko: Sekvonta artikolo temos pri moderna arto.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidentino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Ĝenerala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo”,
Falconrui, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Prezidantaj Paroladoj

En la lastaj semajnoj, nia Liga prezidanto havis la okazon fari du propagandajn paroladojn por nia lingvo en du tute malsimilaj medioj: la unuan en Boom, la 24an de decembro, en la « Rotary »-Klubo de la Rupel-regiono, la duan en Lovenjo, la 7an de januaro, en hejmo de la studentoj de la Universitato.

La ĉiusmejna bulteno de la 162a Rotary Distrikto de la 4a de januaro enhavis detalan raporton pri tiu-ĉi parolado, kiun ni kompreneble ne povas represigi entute, sed el kiu ni tamen volas ĉerpi la jenan resumon pri la celo de nia lingvo mem, kiu pruvigas ke la aŭskultantoj vere atente sekvis la klarigojn.

Kiel kutime, tiu ĉi parolado okazis je la fino de semajna komuna tagmanĝo kaj, post la enkondukaj vortoj, la raporto tekstas jene:

Tute bonvole, S-ro Jaumotte akceptas paroli pri Esperanto. La brila oratoro substrekas unue la celon komunan al « Rotary » kaj al la esperantomovado, nome antaŭenigi la reciprokan internacian interkompreniĝon, la bonvolemon kaj la anon al la Paco. Esperanto, kreita de D-ro Zamenhof, celis en la spirito de la kreinto, alproksimigi la homojn, donante al ili universalan, simplan kaj facile lerneblan lingvon, por faciligi interkompreniĝon sen tradukoj; ĉar traduki signifas interpreti. Tiu-ĉi lingvo artefarita, kiu permesas esprimi sian penson nete, klare kaj komplete, sonas ja vere bele. La oratoro konvinkis nin tiurilate, konkludante sian belan paroladon per harmoniaj kaj kantetantaj frazoj, elparolitaj en tiu-ĉi lingvo, kiu, kvankam artefarita kaj elspruĉita el unu homa cerbo, tamen estas ja vere vivanta kaj uzebla kiel esprimilo de tiuj poetoj, kiuj sekvas la verdan stelon, simbolon de l'Espero ».

Kaj la raporto finiĝas per la cito de la entuziasmaj aplaŭdoj kaj de la dankvortoj de la funkciinta prezidanto S-ro Josse Verbist, kiu cetere estis favorege prezentinta nian Ligan prezidanton.

La dua parolado okazis la 7an de januaro, unuan tagon de la nova monatario por la universitataj studentoj, en la studenta hejmo de la Tiense straat.

Je iniciato de S-ro Wim De Smet, helpata de F-ino Johana De Ketelaere, ambaŭ membroj de la antverpena Grupo « La Verda Stelo », estis starigata, en la kadro de la Universitato, studenta esperanto-grupo.

Por ili parolis nia Liga Prezidanto. Li klarigis la historion de la kreado kaj de la disvolviĝo de nia Lingvo kaj la evoluon de nia movado. Alparolinte, dum plena horo, la vere tre atentan aŭskultantaron, S-ro Jaumotte ankaŭ estis preta respondi al eventualaj demandoj.... Kaj tiuj ĉi multnombraj venis kaj ricevis por ĉiuj kontentigan respondon.

En la salono, estis samtempe organizata bela ekspozicio de revuoj kaj aliaj

KONFITEJO "LA CIKONIO"

G. DENDOOVEN-DERIJCKE

LANGESTRAAT, 52, BRUGGE TEL. 342.73

specialaĵo de bapto-sukero
luksaj kaj ordinaraĵ skatoloj

esperantaj kaj la sekvo de ekspozicio kaj parolado estis, ke multaj studentoj aliĝis al la novstarigita grupeto.

Estis S-ro Wim De Smet, kiu prezentis kaj ankaŭ kore dankis nian prezidanton, dum li ankaŭ salutis la ĉeston de kelkaj samideanoj; inter kiuj certe citinda estas S-ino Meurrens.

LINIO FORFALIS

En la tabelo aperinta en nia antaŭa numero pri la «Fondajo Jennen», forfalis linio inter Gento kaj Lieĝo, nome la linio kun la ciferoj pri nia Bruĝa Grupo.

En alia alineo la Grupo estas citita kun sia procento kaj tiu, kiu faris la adicon povis mem kalkuli la diversajn ciferojn de tiu nia grupo.

Ni tamen volas citi ilin por ke — ankaŭ en nia presita dokumentaro — restu korekte konservataj la oficialaj ciferoj:

Poentoj 1956: 418 1957:380 Procento: 90,9 %.

NEKROLOGO

Ni kun vera malĝojo ekscilis pri la morto, la 13an de januaro, en Uiterke (Blankenberge) de S-ino Charles Decorte-Caty, edzino de nia fidela izola membro.

Ni sendis al li la esprimon de nia kunsento kaj profundajn kondolencojn.

ANTVERPEN

«Esperanto-Grupo «La Verda Stelo»» (Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 20an de decembro S-ro Luc De Marré, en bela parolado, prikraktis la signifon de Kristnasko, laŭ relegia kaj laŭ ĝenerala vidpunkto, kiel komuna simbola festotago de la tag-nokt-egaligo. Li ilustris tiun paroladon per interesaj lumbildoj. S-ino L. Bernaerts poste organizis grandan tombolon, por kiu ĉiu estis alportinta premion.

La 27an, S-ro Fr. Schellekens alportis

vastan ririgardon al la pasinta jaro kaj memorigis la mil kaj unu detalojn de la plej gravaj okazintaĵoj de la jaro. Granda nombro da lumbildoj ankoraŭ pligrandigis la intereson de tiu ĉi plene sukcesinta parolado. S-ro R. Balleux kompletigis la programon per klarigoj kaj bildoj pri la restadejo «Keukenhof», en Nederlando.

La unua programo de 1958a, kiu okazis la 3an de januaro, konsistis el parolata ĵurnalo al kiu, krom la fideluloj de tiu ĉi programo, jam partoprenis diversaj lernantoj de la kurso. La 10an, F-ino Bl. Geers organizis distran vesperon, kiun ŝi, helpe de lumbildoj kaj multaj ludetoj, al kiuj ĉiu povis partopreni, igis sukcesplena.

La 17an, okazis la Ĝenerala Jarkunveno, dum kiu S-ro J. Verstraeten, alportis, kiel sekretario, kompletan ririgardon al la grupa laboro dum la pasinta jaro, dum S-ro R. Balleux, kasis, prezentis la kasan raporton.

S-ro M. Jaumotte, prezidanto, dankis individue ĉiujn siajn kunlaborantojn. S-ro H. Sielens, viceprezidanto, siavice dankis la prezidanton pro la granda de li farita laboro.

Poste estis honorigataj S-roj H. Boffejon, G. Van den Bossche kaj R. Jaumotte (denaskiga) fidelaj membroj, pro 30 jaroj de membreco. Ili ricevis plian steleton sur la rubando de sia medalo. F-ino E. Van der Weken akiris aliflanke, la arĝentan medalon «pro merito» pro sia 5jara daŭra laboro kiel help-sekretariino kaj komitatano.

Dimanĉon, la 19an je la 17a horo,

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPEN

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

sesdek ses gefestenantoj eksidis ĉirkaŭ la tabloj por la ĉiujara grupa festeno, en la salonoj «Goya».

Post la manĝado de vere bongusta menuo, la prezidanto alparolis la ĉestantojn, salutis S-inojn J. Plyson, viceprezidanton de R.B.L.E., S-ron J. Jacobs, prezidanton kaj diversajn ĝemembrojn de la Brusela Grupo, S-ron Van Gindertaelen kaj delegitaron de la Mehlena Grupo kaj ĉiujn ĉestantojn. Li diris sian gojon, ĉar jam multaj ĝelernantoj de la kurso ĉeestas.

Alportis saluton al la Grupo, S-ino Plyson, S-ro R. Jacobs kaj S-ro Th. Van Gindertaelen, kaj fine, S-ro M. De Ketaere salutis la sinjorinojn kaj transdonis al la unua sinjorino de la Grupo, S-ino M. Jaumotte, belan florgarbon.

Dum la festeno, S-ino Thys kaj S-ro A. Peper pianoludis kaj plenigis la salonon per bela muziko. Post la festeno, S-ro Peper daŭrigis kaj ebligis gajan dancadon, tiel ke tiu ĉi jarfesto finiĝis en plej agrabla atmosfero.

La 24an, S-ro Wim De Smet tre lerte paroladis pri sia vojaĝo al Kongolando kaj al Sud-Afriko kaj montris samtempe abundajn lumbildojn, kiuj pligrandigis ankoraŭ la intereson de tiu-ĉi parolado.

La 31an, okazis la diplomdisdono al la lernintoj de la kurso de S-ro Luc De Marré. La Prezidanto gratulis la diplomitojn kaj dankis la profesoron. Tiam sekvis la diplomdisdono al la 26 sukcesintoj en la ekzameno, nome al S-ro V. Baroen, F-inoj H. De Coene kaj M. Cools, kiuj akiris la plej grandan meriton; al S-ro C. Debaene, S-ino S. De Pelsmacker-De Craene, F-ino Maryvonne Dehertoghe, S-ro M. Van Brabant, F-ino A. Verschuere, S-ro J. Borghys, F-ino L. Van Varenbergh kaj S-ino M. Van Veelen, kiuj akiris la grandan meriton; al S-ro A. Peper, S-ro L. Van Bulck, S-ro J. De Hondt, S-ro P. Fla-

ment, S-ro A. Duchesne, S-ino M. Verwerft kaj F-ino G. Van Dorst, kiuj akiris la meriton, kaj al F-ino Yv. Cools kaj S-ino E. Bed, kiuj sukcesis akirinte almenaŭ 60 %. Samtempe estis transdonata la diplomo al du laŭreatoj, kiuj ne sekvis la kurson sed kiuj akiris ambaŭ la plej grandan meriton; S-ro Wim De Smet kaj S-ro Piccarelle. Ĉiuj la membrigitaj diplomitoj krome ricevis la libron «Historio de «La Verda Stelo», verkita de S-ro Sielens, okaze de la 50jara jubileo.

S-ino Bed dankis, nome de ĉiuj, la profesoron L. De Marré kaj transdonis al li belajn donacojn, post kio la profesoro mem parolis por danki la lernintojn kaj instigi ilin al vigla kunlaboro, klarigante al ili la veran signifon de la Lingvo kaj de nia laboro.

Tiam sekvis alloga programo tute kunmetita kaj ludata de la lernintoj mem kaj al kiu kunlaboris F-inoj M. kaj Yv. Cools, H. De Coene kaj M. Dehertoghe, S-inoj M. Verwerft kaj Blick kaj S-roj J. Borghys, A. Duchesne, P. Flament, A. Peper kaj Van Bulck. Ili akiris ĉiuj entuziasman aplaudon kaj varmajn dankvortojn de la prezidanto.

La 7an, S-ro Roger Jaumotte organizis distran vesperon, kiu kreis vere amuzan atmosferon en la plena salono kaj al kies ludoj partoprenis jam vigle la novuloj.

La 14an, S-ro Fr. Schellekens, laŭ admirinda originala maniero, organizis la parolatan ĵurnalon kun la teknika helpo de S-roj J. Montmirail, R. Jaumotte kaj A. Van Dessel. Estis vere sukcesego.

La 21an, estis disaudigataj du teatraĵetoj, ambaŭ tradukitaj de F-ino Bl. Geers kaj al kies realigo partoprenis, por la reĝisoro kaj teknika parto, S-ro Fr. Schellekens kaj J. Montmirail, kaj kiel aktoroj: F-inoj E. De Coene kaj

TURISMA SERVO

Petu turismajn informojn kaj aspektojn pri Belgujo kaj pri la belega Belga Marbordo, kontraŭ respondkupon aŭ samvaloraj poŝtmarkoj. Donas informojn pri la Internacia Ekspozicio 1958 en Bruselo. Rezervas pensionon kaj hotelĉambrojn je moderaĵ prezoj, donas malmultekostan loĝadon en esperantista domo. Ekskursoj tra Belgujo per aŭtomobilo kaj aŭtobuso. Tousseyn Camille, del. de UEA, Statiestr. 35, Jabbeke, Belgujo.

GRAVA SUKCESO ĈE GEVAERT

La mondfama firmo de film-kaj fotografaparatoj GEVAERT decidis uzi Esperanton. Preskaŭ ĉiuj revuoj aperigis la interesan artikolon kiun tiu firmo dissendis kaj la reago de la leganta publiko estis granda. Tio faris kompreneble bonegan impreson. Do Gevaert aperigos en Esperanto tabelon pri lumigo por fotografi kaj broŝureton. Ĝi nun faras ankaŭ kolorfilmon pri la fotoindustrio kaj pri la diversaj fotografiaj aplikadoj. Tiu filmo estas laŭ mezuro 35 mm. kaj kopio havos komenton en Esperanto. Tiu filmo estos montrata dum la universala kongreso de Mainz. Decas tie-ĉi gratuli ankaŭ nian samideanon el Brugo Et. De Baets kiu daŭre kaj racie influis la gvidantojn de tiu firmo kaj kiu cetere estas laboranta sur la tereno de fotografia terminaro.

Cl. Peeters kaj S-ro Fr. Schellekens (en «Antaŭ la Festeno») kaj F-ino Mar. Dehertoghe kaj S-ro Duchesne kaj S-ro Schellekens, kiel enkondukanto (en la dua: «Soforino»). Dank'al ĉies temperamentplena ludo, la sukceso iĝis vere tre granda.

La 3an de februaro, komenciĝis nova elementa kurso, gvidota de S-ro Luc De Marré. S-ro M. Jaumotte faris la enkondukan paroladon antaŭ 56 lernantoj. La saman tagon, S-ro Morris De Kete-laere komencis perfektigan kurson, por kiu enskribiĝis dudeko da lernantoj.

Programo de la venontaj kursidoj

Ĉiuvendrede en «Witte Leeuw», Frankrijklei 4, je la 20,15a h. (1-a etaĝo)

Aprilo: La 4an: Sankta vendreda atmosfero; la 11an: Parolado de F-ino M. Dehertoghe kaj S-ro Duchesne pri vojaĝo al Sudorienta Eŭropo; la 18an: «Tra la Mondo», nova programo: 1-a serio: «La Reĝino»; la 25an: EKI-film-vespero; dimanĉon, la 27an: Jubileo en Charleroi.

Majo: La 2an: Raportoj pri la jubileaj festoj en Charleroi; la 9an: parolado de S-ro Maur. Jaumotte pri «Vizito al la Ekspozicio 1958»; la 16an: Parolata Ĵurnalo; la 23an: Distra Vespero (S-ro Roger Jaumotte).

Junio: La 6an: Vizito al la Antverpena Kermeso; la 13an: Parolata Ĵurnalo; la 20an: «Tra la Mondo»; 2a serio: «Francujo»; la 27an: Diplom-disdono al la lernintoj de la simpla kaj perfektiga kursoj.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

Por inde fini la jaron, la grupo havis la 23an de decembro, en «Concordia» kaj sub la aŭspicioj de la Bruga EKI, komunan kunvenon kun la gemembroj de «Paco kaj Justeco» loka sekcio de Fl. L. E. Sro. Martens, ano de tiu

grupo, lerte gvidis konkurson nomatan: Cerbogiĝnastiko, kiu tre interesis la multnombrajn ĉeestantojn.

La nova societa jaro komenciĝis dum la kunveno de la 7a de januaro dediĉata al la festo de la tri Reĝoj. Bonegaj kukoj preparitaj kaj afable proponitaj de tri membrinoj estis distrantaĵoj kaj la fabo indikis kiel reĝinon S-inon Mantelers, kiu siavice elektis kiel reĝon S-ron Ch. Poupeye. Laŭ la ordono de la gereĝa paro, la ĉeestantoj estis regalataj per vino, kaj la festeto tiel finiĝis en plej gaja atmosfero.

La ĝenerala jarkunveno okazis la 14an de januaro kun la kutimaj raportoj: morala de la prezidanto, Sro. Ch. Poupeye; priagada de la sekretario F-ino Y. Van Parys kaj financa de la kasistino F-ino. Is. Van Parys. Ĉiuj estis aplaŭde aprobatataj kaj la ĉeestantoj reelektis la elirantajn gemitatanojn.

La 21an de januaro, estis donata de Sro. Ch. Poupeye la unua leciono de nova perfektiga kurso, post kio komenciĝis la organizado de la balo de la 15-a de februaro.

Plia leciono okazis la 28an de januaro kaj la dua horo de la kunveno estis dediĉata al komuna legado kaj klarigado de B.E.

Post la leciono de la 4a de februaro, okazis lerniga kartludado kaj post tiu de la 11a, amuza portretludado.

Sabaton, 15an de februaro, en la salonego «Concordia», okazis, sub la signo de Karnavalo, la dua balo de la nuna sezono. Malgraŭ konkurenco de tre multnombraj kaj gravaj aliaj baloj, la salonego estis bone plenigita kaj la ĉeestantoj kiel kutime bonege amuziĝis.

La sekcio de Sint-Michiels kunvenis ĉiulunde; la ĉeestantoj atente sekvis la tre interesan perfektigan kurson bonege donatan de Sro. R. Behaeghel.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAJOJ

Programo de la venontaj kursidoj.

1-e) ĉiulunde, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de Sint-Michiels, leciono de la perfektiga kurso sub gvidado de S-ro. R. Behaeghel. Ĉiuj grupoj estas invitataj kaj estos bonvenintaj.

2-c) ĉiumarde, je la 8a vespere, post leciono de la perfektiga kurso:

a) **dum marto:** en la grupa sidejo «Gouden Hoorn - Cornet d'Or» Simon Stevinplaats, 2; Tel. 314.59;

b) **ek de aprilo** (ĝis septembro): en la provizora kunvenejo «Concordia» Zuidzandstraat, 5; Tel. 366.24;

MARTO: 4an: Kartludado; 11an: Muzika vespero kun komentario; 18an: Parolata gazeto; 25an: Konkursludoj de Sro. R. Behaeghel.

APRILIO: (en «Concordia») 1an: Humorajoj; 8an: Muzika vespero kun komentario; 15an: Konkursludoj de Sro. R. Behaeghel; 22an: Parolata gazeto.

BRUSELO

Reĝa Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero: 12.30.48)

La 25an de novembro, S-ino M. Weyn anstataŭis S-ron Jacobs, malhelpitan. S-ino E. Staes laŭlegis parton de aŭstria teatraĵo nomita «La verda Kakatuo». La vespero finiĝis per ŝercado kaj gaja interbabilado.

La 2an de decembro, okazis parolata ĵurnalo, en kiu akiris la plej grandan poento-nombro: S-ro Castel, por la tradukita kaj S-ro Wuyts, por la legita teksto. Kiel diskuttemo estis elektata: «Sacha Guitry».

La 9an, S-ro P. Piron prizorgis superbelan filmovesperon, dum kiu li montris diversajn interesajn filmojn, sonorigitajn per gramofondisko.

La 16an, jugoslava samideano S-ro Milovanović Dobrica, vizitis la grupon

kunsidon, dum kiu S-ro van der Stempel daŭrigis sian perfektigan kurson, La konversacia parto precipe pritrakts la Bruselan Ekspozicion.

La 23an, S-ro M. Jirousek faris «Regardon al la jaro». Kaj multaj interesaj aŭ spritaj interparoloj sekvis.

La antaŭan tagon, dimanĉon, la 22an, la membroj ĉeestis, en la kadro de E.K.I., brilan feston por memori la naskiĝdaton de D-ro Zamenhof.

La 30an, okazis bela jarfina festo, dum kiu S-ro D. van der Stempel pianoludis, S-ro P. Piron montris tri valorajn filmojn, S-ro Wuyts prezentis humorplenan monologon «La Turisto kun la verda Stelo» kaj la gracia fraŭlino Nadina Baudour regalas la ĉeestantojn per tri ravaj dancoj. Inter ĉiu danco, S-ino E. Staes gvidis plaĉajn ludojn.

Kaj la nova jaro komenciĝis, la 6an de januaro, per parolata ĵurnalo, kun premioj al S-ro van der Stempel kaj S-ino M. Weyn.

La 13an, S-ino Ernst laŭlegis kvin diversajn tradukitajn historiojn, kiujn ŝi vere valorigis per sia nuancoplena kaj sprita legado, kiu plezurigis ĉiujn.

La 20an, okazis la ekzameno de la lernintoj de la elementa kurso de S-ro M. Jirousek, en kiu partoprenis S-ro Devillé, F-ino Dubois kaj S-ino Doolage, kiuj laŭvice akiris la plej grandan kaj grandan meriton kaj sukceson.

La 27an estis transdonata al ili la diplomoj, kiel unua ero en la ĝenerala jarkunsido. Kaj S-ro Jacobs kaptis la okazon por kore gratuli la lernintojn kaj danki la profesoron S-ron Jirousek.

S-ino J. Plyson, vicprezidentino de R.B.L.E., kiu ĉeestis la kunsidon, siavice instigis la diplomitojn al plua studado kaj praktikado.

Tiam sekvis la raportoj de la sekretario, S-ro M. Jirousek, de la kasisto S-ro Schumacher kaj de la bibliotekistino-arkivistino S-ino E. Staes.

La prezidanto dankis la raportintojn kaj ĉiujn siajn kunlaborintojn en la komitato, dum S-ino M. Weyn varme dankis la prezidanton pro la farita laboro.

Post la elektadoj por la komitato 1958, tiu ĉi estas kunmetita jene:

Prezidanto:	S-ro R. Jacobs
Vicprezidantino:	S-ino M. Weyn
Sekretariino:	F-ino R. Huysmans
Kasisto:	S-ro Schumacher
Helpsekretariino:	S-ino R. Jacobs
Helpkasisto:	S-ro P. Piron
Arkivistino:	S-ino Elly Staes

Krome, estis kunmetata helpkomitato, kiu konsistas el: S-ro M. Nanquette, (bibliotekisto), S-ro L. Baudour (festestro) kaj S-ro Wuyts (punisto).

La 3an de februaro komenciĝis nova elementa kurso, ekde nun, gvidata de S-ino R. Jacobs.

Je la komenciĝo de la kunsido, S-ro R. Jacobs prezentis la novan komitaton kaj laŭ propono de S-ro Wuyts, estis akceptata ke ĉiusemajne estos kolektata malgranda sumo por speciala kaso, kiu permesos plivigligon de la kunsidoj. Sekvis tiam la parolata ĵurnalo, en kiu estis premiitaj S-ro van der Stempel kaj S-ro Jacobs, dum la teksto « La Sudpoluso » estis preferata kiel pridiskutota temo.

La 10an S-ino Elly Staes faris tre interesan paroladon pri Damme, la iame fama kaj nun nur malfacile ankoraŭ atingebla urbo de Tyl Uenspiegel kaj akiris per ĝi plenan kaj varman sukceson.

La 17an sekvis je iniciato de S-ino R. Jacobs, Korba Surpriz-vespero, dum kiu ĉiuj bone manĝis la de la sinjorinoj kunportitajn manĝaĵojn kaj krome bone amuziĝis per ĉiusemajn ludoj kaj per skotaj dancoj. Multaj certe deziras reokazon de tiaj surpriz-vesperoj.

Programo de la venontaj kunsidoj

Ĉiulunde, je la 20a h., en « Brasserie de la Justice », Place du Grand Sablon, 38, Grote Zavel, Bruselo la. (Telefono 12.64.76.)

Marto : La 3an: Parolata ĵurnalo; la 10an: Parolado de S-ro Swinne: « Einstein kaj liberekonomio »; la 17an: Perfekta kurso de S-ro van der Stempel; la 24an: Amuza Vesperto, gvidota de S-ro Baudour; la 31an: Debatvespero pri parolata temo.

Aprilo : la 7an: Paska lundo (ne okazos kunveno); la 14an: Parolado de S-ino R. Lecat: « Cambridge »; la 21an: Perfekta kurso de S-ro van der Stempel; la 28an: Amuza Vesperto, gvidota de S-ro Baudour.

Majo : la 5an: Parolata ĵurnalo; la 12an: Parolado de S-ro Nanquette: « Mondskala Katastrofo »; la 19an: Perfekta kurso de S-ro van der Stempel; la 26an: Pentekosta lundo (ne okazos kunveno).

CHARLEROI

Karloreĝa Grupo Esperantista

La jaro 1958a komenciĝis per laborvespero: Efektive la 7an de januaro okazis la jara Generala Kunveno.

HISTORIO DE LA ESPERANTO-GRUP « LA VERDA STELO »

Okaze de la argenta kaj de la ora jubileo de la Esp-o Grupo de Antverpeno, ni eldonis broŝuron kiu estis verkita respektive de S-ro Maur. Jaumotte kaj H. Sielens.

La enhavo prezentas interesan legon kiu, por novuloj povas servi kiel unua legolibro, por spertuloj, kiel fonto de informado.

La broŝuroj estas ankoraŭ haveblaj en limigita kvanto: Eld. 1932 — Fr. 10,— Eld. 1957 — Fr. 20,— La du broŝurojn kune, ni liveras por Fr. 25,— BELGA ESPERANTO INSTITUTO K.S. OOSTENSTR. 26, ANTWERPEN. Pĉk N° 1689.58. Telefono N° 30.15.56.

Estis prezentataj la morala kaj financa raportoj por la jaro 1957 kaj pristudataj kelkaj projektoj por la komenciĝinta jaro. La ora jubileo de la Grupo estos festata la dimanĉon, 27an de aprilo.

El la prezentita bilanco evidentiĝas ke la pasinta jaro estis plej fruktodona por la Grupo kaj estas jam certe ke tiu-ĉi jaro estos ankoraŭ pli bona, dank'al la sindonemo de la membroj kaj al la amika kunlaboro, kiu regas la grupan rondon.

La 25an de januaro, plia interesa vespero: S-ro Bray, membro de la Grupo, aŭdigis, per sonbendaparato, prelegon de Prof. Ohsawa, pri la dieteca kuracado en Orientaj landoj. S-ro Bray, adepto de D-ro Ohsawa, brile komentariis tiun prelegon. Li aldonis multajn informojn kaj klarigojn kaj respondis al diversaj demandoj de la ĉeestantoj.


Kaj la karloreĝaj esperantistoj, ekde nun, atendas la aliajn samideanojn multnombre en Charleroi okaze de la jubileaj festoj de la 27a de aprilo. Ili intertempe preparos agrablan tagon por ĉiuj.

LOVENO

Parolado kaj kurso

Post parolado de S-ro Jaumotte, pri kiu raporto estas presata sur antaŭa paĝo, komenciĝis kurso en la Studenta hejmo de la Tiense straat, por kiu enskribiĝis kelkdekoj da lernantoj.

La propagandon por tiu ĉi kurso iniciatis la eks-studento Lic. en Biologio S-ro Wim De Smet, kiu cetere ankaŭ



Por instigi la legantaron al solvado de la aperigitaj enigmoj — fakte tempasigo agrabla kaj instrua — el nia revuo la redakcio donacos premiojn laŭ jena sistemo: ĉiam kiam unu partoprenanto obtenas nombron de 50 poentoj (kaj tio eblos post 5 aŭ 6 fojoj de regula ensendo) li ricevos premion kaj rekomencos denove je 0 poentoj. Tiamaniere ĉiuj gepartoprenantoj estas certaj ke ili iam ricevos premion eĉ se kelkfoje ili erare solvis aŭ kelkfoje ne ensendis.

La solvojn oni sendu al la redakcio ĝis fino d. monato. Ĉar la komenco estas ĉiam malfacila ni ĉi-foje donas pli malpli facilajn enigmojn. Iom post iom ni pli malfaciligos la taskojn.

Grava rimarko: la litero R inter krampoj (R) post iu ajn difino signifas ke la trovota vorto estas radikvorto.

1. Magia kvadrato: Formu horizontale kaj vertikale la samajn vortojn laŭ sekvantaj difinoj:

faris la unan lecionon, sed kiu devis rezigni ĉar li intertempe devis soldatiĝi.

Tuj S-ro Luc De Marré, profesoro de « La Verda Stelo », akceptis daŭrigi tiun ĉi kurson, kaj ĉiusemajne veturas al Lovenio. Li tial meritas ĉies dankon.

Aliaj membroj de la Antverpena Grupo cetere apogas tiun ĉi iniciaton, i.a. F-ino Johana De Ketelaere, S-ro Arthur Duchesne, akurata membro de la Grupo sed loĝanta en Lovenio kaj F-ino Maryvonne De Hertoghe, kiu, cetere kun diversaj aliaj verdstelanoj, estigis kontaktojn kun la novaj, esperantistigantaj studentoj.

Dank'al tiu ĉi helpo, ni povas fidi ke la juna Studenta Grupo, kiu starigis en la kadro de la K.F. Asocio de Universitataj Studentoj, povos vivadi, des pli ĉar Prof. H. L. Pauwels, profesoro de nederlandlingvaj gramatiko kaj elparolo, kiu jam en 1954, dum kongreso de studentoj pri ĝermanaj lingvoj, parolis pri la avantaĝoj de Esperanto,

nun ankaŭ instigis siajn studentojn ne resti indiferentaj ĉe la starigo de tiu ĉi grupo, dum L.E.M. Van Wayenbergh, rektoro de la Universitato, ne nur aprobis la starigon, sed promesis firman apogon tuj kiam la grupo estos pruvinta sian vivkapablon kaj vivemon.

Ni kore gratulu S-ron Wim De Smet la simpatian fondinton kaj dumtempan prezidanton de la nova grupo, al kiu ni deziras plej grandan bonfarton kaj al kiu ni cetere promesas nian plenan apogon.

G. WARINGHIEN — Grand Dictionnaire Esperanto-français. 370 paĝoj 14 x 20 cm. tolbindita — Fr. 322,— afrankite. Kun plezuro ni informas nian klientaron kaj la aliajn membrojn de B.L.E., ke post venko de gravaj malfacilaĵoj kaj multe da laboro, tiu ĉi verko nun aperis kaj estas havebla ĉe ni. BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, Oostenstr. 26, ANTWERPEN. Pĉk N° 1689.58.



Bibliografio

Dum kelkaj jaroj, nia revuo estis eldonata en kunlaboro kun revuoj el najbaraj landoj.

Pro tiu kunlaboro kaj la centrigo de kelkaj servoj, povis okazi ke, pro miskompreno, NE aperis en nia revuo bibliografia preparolo pri iu aŭ alia libro, tamen ensendita de la eldonejo.

Ni invitas la aŭtorojn aŭ la eldonintojn averti nin, se ili rimarkis tian mankon, kiu estis tute sendependa de nia bona volo kaj kiun ni cetero deziras TUJ ripari.

Ne necesas re-ensendi libron. Nur atentigi nin, por ke ni rekonsideru la aferon.

Cesigis efektive nun tiu inter-nacia kunlaboro kaj nia redakcio do reigis tute sendependa kaj intencas dediĉi specialan zorgon al la preparolo de noveldonitaj libroj, kies ekzempleroj devas esti sendataj, kiel antaŭe, al la adreso de la revuo.

1) altranga ekleziulo

I

2) loko kie okazas bovobataloj (R)

2

3) malvenki (R)

3

4) leviĝo kaj refalo de akvo.

4

2. Divenaĵoj :

a) Mi estas la ŝipo de la dezerto :

— senkapigita mi iĝas speco de kaĉo

— denove senkapigita mi subite estas besto ?

b) Nomlisto mi estas :

— senkapigita mi iĝas krustaco

— ree senkapigita mi nun estas vasta akvosurfaco

— kaj denove senkapigita mi formas amason ?

3. Ciferenigmo : Anstataŭigu la ciferojn per literoj laŭ la donitaj difinoj. Je ekzakta solvado de la difinoj vi trovos de 1 ĝis 27 tre konatan proverbon.

7 - 10 - 24 - 6 - 14 - 20

nepre bezonata

3 - 9 - 5 - 16 - 12 - 2 - 12 - 4

grupo da personoj, elektitaj por konsistigi specialan kunvenon

19 - 27 - 1 - 23 - 5 - 4

granda antipatio

15 - 25 - 10 - 26 - 9

restadejo de Dio

22 - 17 - 21 - 14 - 13

nenatura

8 - 16 - 18 - 9

plata malbonodora insekto

11 - 2 - 19 - 13

simila.

4. Ĉenenigmo : Per la ĉi-subaj difinoj formu 14 kvarliterajn radikvortojn

ESPERANTO KAJ FILATELIO

Ĉar ekzistas multaj filatelitoj en niaj vicoj mi opinias ke ili eble interesiĝos pri la poŝtmarkoj, kun temoj pri la mondlingvo aŭ kun tekstoj en la mondlingvo, ĝis nun eldonitaj en diversaj landoj.

Ĉar la kvanto ne ankoraŭ estas tro granda la amatoroj eble sukcesos akiri ilin ĉiujn post iom da serĉado aŭ interŝanĝado kun samideanoj filatelitoj el la koncernaj landoj. Mi donas la numerojn laŭ la katalogo Yvert et Tellier ĉar sendube la plej granda nombro de niaj abonantoj uzas ĉi-tiun katalogon. Jen do :

Eldon-jaro	Katalog-numero	Valoro	Koloro(j)	Detalaj informoj
------------	----------------	--------	-----------	------------------

1. — Aŭstrujo

1949	770	20 g	smeraldverda	memorigo pri la Esperanto Kongreso en Graz
1954	838	1 s	bruna, olivkolora kaj verda	memorigo pri la duoncent-jara ekzisto de Esperanto en Aŭstrio.

2. — Brazilujo

1935	299	200 r	ultramara	memorigo pri la 8-a internacia foiro (Esp. teksto).
1936	311	200 r	rozkolora	id. pri la 9-a foiro.
1937	315	300 r	verdflava	memorigo pri Esperanto Kongreso.
1937	333	300 r	verda	duonjarcenta datreveno de Esperanto.
1945	423	40 c	verdblaua	memorigo pri Esp. Kongreso en Rio de Janeiro.
1945	A. 47	1 cr	bruna	id. (acropoŝtmarko).

komencante ĉiam per la lasta litero de la antaŭa vorto. La unua vorto komencas per la lasta litero de la lasta vorto.

1. muzikilo 2. insekto 3. vaporigema fluidaĵo 4. fingroornamaĵo 5. bleki kiel korvo 6. skribilo 7. papa krono 8. konstruaĉo 9. montrilo de kompas 10. teleskopvitro 11. monstra fiŝo 12. bildeto de sanktulo 13. vaporigema fluidaĵo 14. hejtajo.

3. — Bulgarujo

1947	547	201101	brunruĝa kaj verda	memorigo pri Esperanto Kongreso.
1957	899	44 c	malhelverda	70-a datreveno de Esperanto kaj duonjarcenta datreveno de la Unio de Bulgar. Esp.

4. — Hungarujo

1957	A. 192	60 fi	brunruĝa	70-a datreveno de Esperanto.
1957	A. 193	1 fo	verda	id.

5. — Ruslando

1925	338	7 k	bluverda	je honoro de Popov (teksto en Esperanto).
1925	339	14 k	malhelverda	id.
1926	357	7 k	verdblaua k ruĝa	Internacia SAT kongreso
1926	358	14 k	id k violkolora	id.
1927	381	14 k	verdflava k bru- na	40-a datreveno de la kreado de Esperanto.
1927	382	14 k	id.	id. (sed sen filigrano).
1927	408	8 k sur 7 k	bluverda	estas la nro 338 surstampita per alia valoro
1927	408a	id.	id.	id. (sed la cifero 8 estas ren- versite stampita).
1927	411	id.	verdblaua k ruĝa	estas la nro 357 surstampita per alia valoro
1930-33	455	1 r	blu-ardezkolora	Telegrafcentrojo en Moskvo (Esperanto teksto).
1930-33	455a	1 r	id.	id. (sed alia filigrano).

6. — Jugoslavujo

1953	638	15 d	griza kaj verda	memorigo pri la 38-a UEA kongreso en Zagreb.
1953	A. 48	300 d	blua kaj verda	id. (aerpoŝtmarko).

Rimarko : krome ekzistas multegaj specialaj poŝtstampoj diversformaj kun Esperanto-tekstoj (i. a. en Belgujo okaze de la Beneluksa Esperantokongreso en Antwerpen) sed tia kolektado fakte estas aparta amatoraro pri kiu mi ne spertas.

(verkis : ISERENTANT Roger)

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

W. Van Nereaux-Ameryckx, Overdekte Markt, 22-24, Van Wesenbekestr. — Viandisto.	Tel. 33.75.38
Hugo Jacques, Lange Beeldekenstraat, 25. Presaĵoj	Tel. 32.62.86
„Schoenen BED” (S-ino E. Bed), Lge. Gasthuisstr. 6. Ŝuoj	Tel. 32.67.21
G. Faes, Schoenmarkt, 16. Ĉiuj muzikaĵoj, instrumentoj, radio kaj gramofono	Tel. 32.67.21
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Anoncoj en tagjurnaloj.	Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado.	Tel. 45.81.07
R. De Soete-Vanistendael, Dambruggestraat 234, Okulvitroj — Rab. 5 %	
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68. Apotekejo	Tel. 35.40.67
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken	
Vitraĵoj — Speguloj.	Tel. 37.88.20
J. Van Nereaux, Sterstraat 1. Viandisto	Tel. 39.55.81
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Inĝen. : Neonlumo, Reklamoj.	Tel. 81.48.47
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj.	Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34. Fumaĵoj — Pantoŝloj.	Tel. 37.62.55
A. van den Neste, Deurnebaas 30, Merksem. Presad-inkoj.	Tel. 45.78.59
„In 't Duiŝken” (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64 : Kostumoj (5 % rab.)	
Vino Max Bolsius, Diepestr. 58-60 : Kuirejlaro.	Tel. 32.57.85
M. Philips, K., Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj — Rab. 5-10 % p.l. membroj.	
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg	
ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj.	Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arĥitekto.	Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25. Privataj lecionoj pri lingvoj, ankaŭ pri Esperanto.	Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Lange Beeldekenstr. 31. Gramofonaj diskoj por meminstruado.	Tel. 33.75.38
J. Van Hoof, Marialei 7. Pentraj-entreprenoj	Tel. 39.35.33

Bruĝo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando	Tel. 371.93
Charcuterie Strovei, Vlamingstraat 38 (Teatroplaco). Viandvaroj.	Tel. 334.08
Maison Joye, Geldmuntstraat 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj.	Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, Spinolarei 19 : Konstrumaterialoj. Speciale naturŝtono de Jura.	Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. Rosseel, Mariastraat 30. Konsumsalono.	Tel. 338.34

Bruselo

M. Jirousek, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj	Tel. 18.77.67
Farmaciisto Jacobs, 94 rue général Eenens Bruxelles 3.	Tel. 15.26.01
„Bonbons Swinne”, 77 rue de Nieuwenhove.	Tel. 44.57.36
Carrelages „Carrat”, 19 avenue de Saxe.	Tel. 21.74.49
KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj	
G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Frizitoj por sinjoroj.	Tel. 39.22.81
„De Boerinnkens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.	Tel. 37.14.07
A. Roels, Montignystraat 155. Ledaj artikloj-Selisto.	
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36 : luo, aĉeto. vendo de libroj.	
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Frankijklei 32 : privataj kaj grupvojaĝoj.	

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54



Reprezentanto en Nederlando :

J. C. den hartog, kostverlorenstraat, 91

zandvoort, tel. k 2507/2008